

# KIU ESTAS KIU EN SCIENCO KAJ TEKNIKO

Estas priskribo de sciencistoj, kiuj iagrade scipovas esperanton.

La unua prototipa eldono, kiu ĵus aperis, entenas 225 personojn kaj informas pri ilia profesia situacio. Ĝi krome havigas la bibliografion de iliaj plej gravaj verkoj esperant- kaj naci-lingvaj.

Venontaj eldonoj ĝisdatigitaj kaj pliampleksigitaj estas antaŭviditaj aperadi ĉiun duan aŭ trian jaron.

KIU ESTAS KIU EN SCIENCO KAJ TEKNIKO 1981

Kostas DM 30, — (germanajn markojn) + DM 3, — por sendokostoj, aŭ egalvaloron. Kutimaj rabatoj estas haveblaj.

Mendebla ĉe la aŭtoro-kompilanto.

Okaze de antaŭpago, DM 30,- inkludas la sendokostojn.

Aŭtoro: *Ing. Christian Darbellay*
*Jostenallee 45*
*D-4040 NEUSS 1*
Germanio (BRD)
Telefono: (..49-/0-) 2101 - 54 74 70
Poŝtĉekkonto: Kolonjo 2567 22 - 505

SCIENCA REVUO, vol. 33 (1982), n-ro 4 (142)

# La prezoj de la libroj

*Kazimierz Szczurek* (Pollando)*

La vorto "prezo", eĉ preter nia volo, pelas nian penson al monujo. Trarigardante libron en vendejo, ni ĉiam turnas ĝin kaj esploras, kiom ĝi kostas. De tiu ĉi kutimo ne povas liberiĝi eĉ la plej grandaj libroamikoj, por kiuj ja la indikita prezo havas tre relativan signifon. Sed la termino "prezo" rilate libron, ne estas unusignifa; signifojn ĝi havas almenaŭ kelkajn.

La **vendeja** prezo (nomata ankaŭ malneta, etkomerca) indikas, kiom pagu aĉetanto en ordinara librovendejo.

La **eldoneja** prezo (neta, rabatita, grandkomerca) estas tiu, kiun postulas eldonejo de librovendisto; do ĝi estas la vendeja prezo minus gajno de la vendisto.

Alia prezo estas la **abona** (subskripcia, antaŭmenda, antaŭpaga): ĝin pagas, kiu estis deklarinta aĉetemon, antaŭ ol la libro aperis. La abona prezo estas nur provizora, kutime malpli alta ol la posta vendeja, ĉar ĝia tasko estas altiri kiel eble plej multajn aĉetontojn kaj al la eldonisto certigi disvendon.

La **propra** prezo alportas nenian gajnon; ĝi egalas al la kostoj de la publikigo; oni kalkulas ĝin tiel, ke la libro ne donu malprofiton.

La **ŝanĝita** prezo (malpli alta) celas disvendon de libroj, kiuj vendiĝas malrapide, longe restante en stokoj.

La **fiksa** prezo (stabila) estas relative nova, en la paseo ĝi ne ekzistis. La prezon difinis ĉiufoje la vendisto mem. Eĉ nuntempe ne en ĉiuj landoj ĝi ekzistas. La fiksa prezo estas presita sur la dorsa flanko de la libro kaj en la t.n. "atesto" (indikoj pri la preso, amplekso, papero, formato, presejo k.t.p.).

Ekzistas ankaŭ t.n. **antikvaĵeja** prezo. En antikvaĵejon venas libroj jam

* *Przepilińskiego 28, 43-400 CIESZYN*

disvenditaj, ne plu aĉeteblaj en librovendejoj, uzitaj, sed ankoraŭ uzeblaj, kaj — precipe — libroj malnovaj, eĉ tre malnovaj. Ilia prezo sendependas de la prezoj vendejaj; fiksas ĝin rilate al ĉiu opa peco — la antikvaĵisto mem, depende de la bezonateco, malofteco, malnoveco de la presaĵo aŭ de la manuskripto. Elstaraj antikvaĵejoj eldonas specialajn katalogojn de siaj libroj, kun aktuale validaj prezoj; tiuj prezoj troveblas ankaŭ en diversaj fakaj revuoj, kiel ekz. *Book Auction Record, American Book Prices Current, Jahrbuch der Auctionpreise*.

Sed la libroprezo, antaŭ ol fariĝi tiel stabila, aŭ prefere stabileta, kiel ĝi estas hodiaŭ, travivis longan vivon — kaprican, ŝanĝoplenan, jen prosperan, jen mizeran.

Pri prezoj de libroj en la antikva tempo ni, verdire, scias preskaŭ nenion. Troveblas kelkaj lozaj mencioj en tekstoj de antikvaj verkistoj, sed se oni ne scias, pri kiaspeca libro temas — ĉu pri granda aŭ malgranda, ĉu skribita zorgeme aŭ malzorgeme, ĉu bona aŭ foruzita, de kiu aŭtoro devenanta — kion oni povas konkludi? La prezo, supozeble, dependis de la skribmaterialo, kosto de la kopiado; ankaŭ la vendanto volis havi gajnon. Ŝajnas ankaŭ, ke la prezoj tre osciladis. Tamen ili en la antikva tempo ne atingis sian apogeon; tiu venis ne pli frue ol mezepoke. La kreskon klarigas la diferenco inter la antikva kaj la mezepoka libroj.

La antikva libro estis — komence nure, poste plejparte — papirusa volvaĵo. La produktado de la papiruso ne estis tiel komplikita kaj multekosta kiel la produktado de la pergameno. La ornamado — kvankam jam praktikata — ne kompareblis kun la ekstreme riĉa ornamado de la posta, mezepoka libro; krome aldoniĝis nova faktoro, grave influanta la libroprezon: la bindaĵo: Ĝi, fojfoje estanta la plej riĉa parto de la libro, postulis multan penon kaj multekostan materialon: plej altkvalitan ledon, daŭrajn farbojn, arĝenton, juvelojn eĉ oron, kaj precizan, longan laboron. Ni imagu mezepokajn librojn, ekz.: EVANGELIARO EL ROSANO (*Codex Rossanensis*) — la plej malnova konserviĝinta evangeliaro ornamita, farita en la 6-a jarcento, trovita en 1879, enhavas tekstojn de Marko kaj Mateo. Ĝi estas skribita per arĝento sur purpura pergameno, enhavas 12 miniaturojn, du dekoraciajn titolpaĝojn por la kanonoj, kaj portreton de Marko.
ULFILAS-BIBLIO (*Codex argenteus*), devenanta same el 6-a jc., estas skribita same per arĝento, sed ankaŭ per oro sur ruĝa pergameno.
MSTISLAV-EVANGELIARO, unu el la plej valoraj manifestaĵoj de la malnova rusa arto, enhavas grandajn vinjetojn ĉe komenco de ĉiu ĉapitro, kaj kvar tutpaĝajn miniaturojn kun portretoj de la evangeliistoj. Post kiam en 1125 oni fortransportis ĝin al Konstantinopolo, oni bindis ĝin en tabuletoj kovritaj per arĝentaj filigranoj, valoraj gemoj kaj oraj plaketoj kun emajlaj portretoj de sanktuloj. Kiom longe kaligrafo skribis tian libron? Ĉu dum monatoj, jaroj? Kiom longe kaj pene pentris ĝin pentristo-miniaturisto? Kiom longe laboris bindisto? Kaj pri la bezonita pergameno atestu almenaŭ unu ekzemplo (kvankam el pli posta tempo):

La fama 42-linia BIBLIO, presita fare de *Gutenberg*, estis duvoluma; la unua volumo enhavis 324, la dua 315 pergamenajn foliojn. Por presi unu volumon, oni bezonis 340 foliojn,t.e. ledon el 170 bovidoj!

Ne mirinde do, ke la prezoj estis grandegaj. Ni konas multajn okazojn, ke por valora manuskripto oni postulis vilaĝon aŭ eĉ pli: ornamitan misalon oni pagis per bieno aŭ vitejo; doni por libro ĉevalon kun plena jungaĵo aŭ rajdekipaĵo, tio estis afero tute ordinara.

Ĝis nia tempo konserviĝis dekduajarcenta (fragmenta) fakturo por kopiado de evangeliaro; ĝi rilatas al bizanca libro, sed proksimume eblas rilatigi ĝin ankaŭ por libroj eŭropaj: "... kalkulitaj kostoj por tiu ĉi evangeliaro estas jenaj: por pergameno 13 hiperperojn, page al la kopiisto kaj por la ilaro 18, por la titola paĝo kaj lazurigo de la randoj (?), por aparta orado de la ĉapitroj kaj titoloj de ĉiu evangelio 30 hiperperojn, page por la oraĵisto 8 hiperperojn, por bindisto (?)".

Kiel rimarkeblas, kelkaj prezoj mankas, sed eĉ la konserviĝintaj donas sumon de 69 hiperperoj. Ĉar la bizanca hiperpero egalis al proksimume 0,57 da floreno, tio donas 40 florenojn.

Cetere, prezoj variis depende — interalie — de tio, kiom multaj estis kopiistoj en koncerna regiono. Nepras konscii, ke fine de la mezepoko apud kopiistoj monaĥejaj aperis ankaŭ laikaj, ofte studentoj de la ĵus fonditaj universitatoj. Nivelo de tiuj kopioj ege diversis, kio ne estis sen influo je la prezoj. Do, se en 1399 misalo kostis 240 florenojn, en 1417 eblis akiri ĝin por 48 florenoj.

La prezojn de malnovaj grekaj manuskriptoj fortege influis la falo de Bizanco. Turkoj vendadis sian predon je mirinde malaltaj prezoj, ja kristana libro por ili estis ne nur senvalora, sed eĉ malŝatinda. Post kiam en Eŭropo kreskis interesiĝo pri grekaj libroj kaj oni, eĉ avide, ekkolektis ilin, kreskis ree iliaj prezoj. Tiu ĉi konstato validas precipe, eĉ eksterordinare, por la jaroj de la trenta koncilio (1545-1563), kies partoprenantoj avide ĉasis valorajn librojn. La okazon elprofitis kelkaj entreprenemaj tiutempuloj, por ple-

nigi sian saketon. *Eparĥos*, loĝinta sur Korfuo, sed post ties konkero transloĝiĝinta al Venecio, sian valoran libraron donacis al Francisko la Unua kaj ricevis premie 1000 dukatojn. Sendepende de tio *Eparĥos* vendis 100 manuskriptojn al la urba biblioreko en Aŭgsburgo je 800 "oraj moneroj" (*nummis aureis*). Post kiam li akiris novajn volumojn, li volis vendi ilin al la princo *de Medici*, al kiu tamen la sumo de 1000 ŝajnis tro granda. La librojn, post la morto de *Eparĥos*, aĉetis la hispana ambasadoro por la apenaŭ planata, sed poste tre fama Eskorial-biblioteko. Hieronimo Fondinto vendis 600 grekajn volumojn al Francisko la Unua je 4000 taleroj.
La elstara humanisto *J. Laskaris* aĉetis por la princo *Lorenzo de Medici* 44 manuskriptojn je 450 dukatoj.
Sur kelkaj manuskriptoj de Eskorial-biblioteko, devenintaj el la kolekto de *Antonio de Covarrubias*, troviĝas rimarkoj pri la prezoj, kiujn oni pagis por la koncernaj volumoj. Tiuj prezoj videble dependis de rareco de la verkoj:
KOMENTARIOJ PRI (la verkoj de) ARISTOTELO, ĝis nun ne eldonita verko, kostis 150 realojn;
KONTRAŬ MATEMATIKISTOJ de *Sextus Empiricus*; tiu ĉi, jam presita, libro kostis 8 realojn;
KONCIZA KOMENTARIO PRI 600 IMPERIESTRAJ LIBROJ (*Novellae de Justinianus*) kostis 200 realojn.

Sed, postkurante libroprezojn, ni — sen rimarki tion — preterlasis du gravajn eventojn: ekuzadon de la papero kaj inventon de la preso; por la libro ili ja havis ekstreme grandan signifon. En la 16-a jc. finiĝis, principe, grandskala komercado per manuskriptoj. Kio estis trovebla, tion oni plejparte trovis. Poste la libromerkaton konkeris la libro presita sur papero. Ĝi, pli facile akirebla, ege malpli multekosta, anstataŭis la grandan pergamenan volumon. Sed tuj necesas aldoni, ke la prezoj de la paperaj libroj presitaj ankoraŭ longtempe superadis la hodiaŭajn.

Sur vastaj teritorioj de la 16-jarcenta Pollando, ekz. *CATECHISMUS CALVINI* kostis 6 florenojn, *SPECULUM SAXONUM* kaj *DIVI AUGUSTI OPERUM EPITOMA* 10 florenojn, *HISTORIA TITI LIVII* (2 volumoj) 20 florenojn. En la 17-a jc. SATIROJ de *Opalinski* kostis 4,15 florenojn, EKONOMIKO de *Haur* 20 florenojn, sed *HERBARIUM* de *Sirenius* 100 florenojn kaj geografia atlaso 150 florenojn. En la 18-a jc. aperadis multaj etkostaj broŝuroj; prezoj de lernolibroj tre magriĝis, sed tio ne signifas, ke formortis pli multekostaj eldonaĵoj. Biografioj de sanktuloj kostis 20-30 florenojn, Biblio 80 florenojn.

# science revuo

oficiala organo de
internacia scienca asocio esperantista
(isae)

volumo 33 (1982)

Pizo (Italio), 1982

## Landaj delegitoj de ISAE:

| | |
|---|---|
| **Argentino** | *Dr. Máximo Valentinuzzi, Gascón 520, RA-1181 Buenos Aires* |
| **Aŭstralio** | *Ing. K. McG. Bowling, 42 Catalpa Crescent, Turramurra, NSW, 2074* |
| **Aŭstrio** | *AEI, Grete Breunlich, Stoesslgasse 2/8, A-1130 Wien* |
| **Belgio** | *Léon J. Hauregard, rue du Centenaire 147, B-4600 Liège-Chênée* |
| **Brazilo** | *Ing. Enivaldo Alves Silva, CxP 04-0144, BR-70000 Brasília (DF)* |
| **Britio** | *Dr. Marjorie Flint, 3, Longcroft Park, Beverley, N. Humberside HU17 7DY* |
| **Bulgario** | *Ljubomir Miĥajlov, str. Valentin Andreev 41, BG-1619 Sofia* |
| **Ĉeĥoslovakio** | *Jiří Laube, Alej RA 811, CS-413 01 Roudnice n. L.* |
| **Danlando** | *Prof. Paul E. Kustaanheimo, DIA-E, 451, Danmarks Tekniske Højskole, DK-2800 Lyngby* |
| **Finnlando** | *M. Rekunen, Kautiala, SF-36200 Kangasala* |
| **Francio** | *Féodor Jelenc, 97, rue A. Fradin, F-86100 Châtellerault* |
| **F.R. Germanio** | *Dr. Gerhard Kalckhoff, Schuckertstr. 14/XI, D-8000 München 70* |
| **Hispanio** | *Johano Guíñón C/ Wilfredo 6-3°-2a, Barcelona 1* |
| **Hungario** | *János Sárközi, Cserje u. 35, H-2600 Vác* |
| **Italujo** | «Edistudio», *cas. post. 213, I-56100 Pisa* — pĉk 12230561 |
| **Japanio** | *Prof. S. Kawamura, 427-7 Kinasityô Huzii, Takamatu, 760* |
| **Jugoslavio** | *Ing Krešimir Polak, Opsenice 7, YU-41000 Zagreb.* |
| **Meksikio** | *Héctor Vázquez, Avenida 7 No 267, México, 13, D.F.* |
| **Nederlando** | *Ing. J. O. de Kat, Kraaienlaan 3, NL-2566 RA Den Haag* |
| **Norvegio** | *Prof. Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N-Oslo 2* |
| **Novzelando** | *Prof. C. J. Adcock, 174 Oriental Parade, NZ-Wellington 1* |
| **Pollando** | *Dr. K. Ostrowski, ul. Lilli Wenedy 11/49, PL-308-33 Kraków* |
| **Portugalio** | *Portugala E-A, R. Dr. João Couto, 6 R/C.-A, Lisboa 4* |
| **Rumanio** | *Ing. Dorin Hehn, Lugojuluj 21, sc. A, R-1900 Timişoara.* |
| **Sovetio** | *B. V. Tokarev, Širokaja 16, kv. 200, SU-129224 Moskva* |
| **Svedio** | *Christer O. Kiselman, Tuvängsvägen 38, S-752 45 Uppsala* - pĉk 55 5735-0 |
| **Svisio** | *Rudi Hauger, ETH-Hönggerberg, Laboratorium für Festkörperphysik E17 CH-8093 Zürich.* |
| **Usono** | *Ken Thomson, P.O. Box 663, Houston, TX 77001* |
| **Venezuelo** | *prof. Juan Eduardo Bachrich, Apto. 3833, Carácas 1010 A* |



Al la supraj indikoj ŝajnas aldonendaj kelkaj rimarkoj. Jen la prezoj, indikitaj en diversaj mono, estas iome nebulecaj por hodiaŭa homo. Por klarigi ilin, ĝustas ekonduki kelkajn komparaĵojn kaj "gaŭĝojn":

**Floreno** estis ora monero, peza 3,54 g, lanĉita en 1252 en Florenco; ekde la 14-a jc. oni uzadis ĝin (aŭ similan) ankaŭ en Germanio, Hungario, Bohemio kaj Pollando.

**Dukato** estis ankaŭ ora monero, peza 3,5 g, lanĉita en 1284 en Venecio kaj poste uzata en pluaj landoj.

**Guldeno** estas termino, aplikata en Germanio en la 14-15-a jc. por dukatoj kaj florenoj.

La prezoj, trovitaj en diversaj tekstoj (do prezoj malsamaj en diversaj lokoj, prezoj nestabilaj) fine de la 15-a jc., kostis proksimume: bovo 5, ĉevalo 15, unu paro da ŝuoj 0,5, ŝafa pelto 1,2 florenojn. Komence de la 18-a jc., bovo kostis 40, ĉevalo 45, unu paro da ŝuoj 1,2, ŝafa pelto 8 florenojn. Fine de la sama jc., bovo kostis jam 70 florenojn.

Sed laŭ fluo de l' tempo, precipe dum la 19-a jc., daŭre kreskadis la nombro da homoj, sciantaj legi. Aperadis diversaj sciencaj asocioj, klerigaj societoj, bibliotekoj k.t.p., senĉese do vastiĝis la medioj, al kiuj la libro devis servi. Ĝia prezo, jam indikita en mono pli bone konata al ni ol la mezepoka kaj renesanca, pli kaj pli proksimiĝadis al nia hodiaŭa koncepto pri libroprezoj. Pro tio plua transkalkulado ŝajnas superflua. Libroj, kvankam konsiderinde multekostaj ankoraŭ, fariĝis tamen objektoj akireblaj al ĉiu, tiom pli, ke krom eldonoj luksaj aperadis ankaŭ multaj eldonoj popularaj, ofte presitaj ne tre valore, sed vendataj etkoste.

Rakontante pri libroprezoj, ni ĉiam retrorigardadis; ja ĝuste la historiajn pritraktojn ni celis. La nuntempaj prezoj estas problemo aparta, preskaŭ strikte ekonomia, do meritanta pritrakton alifojan.

Sed restas ankoraŭ unu afero, ĝis nun ne tuŝita, tamen nedisigeble ligita kun la historia evoluo de la libroprezoj. Jen, komence de la 17-a jc. — apud librovendejoj kaj foiroj — aperis nova faktoro, forte influanta la prezojn de malnovaj libroj: la **aŭkcioj**. La aŭkcio estas unufoje aranĝita publika disvendo al tiu, kiu proponas pli grandan sumon. Laŭdire, la unuaj aŭkcioj okazis en Lejdeno, tuj komence de la 17-a jc.; iniciatis ilin la fama nederlanda presisto-eldonisto *Ludwig Elzevier*. Post nelonge ili oftiĝis en Francio kaj Germanio. En Anglio establis ilin (1676) *Joseph Hill*, Usonon ili atingis en 1713. Baldaŭ tiu komerca novaĵo altiris plenan atenton de bibliofiloj. Al ĉiu anoncita aŭkcio ili hastis kvazaŭ orserĉantoj al Eldorado. La "ora epoko"

de aŭkcioj komenciĝis en la 18-a jc.; tiam elkreskis grandaj privataj libraroj, ofte dank al pereo de aliaj. Ĉiufoje post kiam kolektiĝis la aĉetontoj kaj oni komencis aŭkcii, la etoso fariĝis plene streĉa, kaj, se "sub martelon" venis iu eksterordinare valora verko, la streĉo ekstremis; ofte okazis eĉ dramecaj konfliktoj. Ja temis fojfoje pri enormaj prezoj.

*PERONIUS DIALOGUS*, eldonita en Parizo (1554), kostis en la aŭkcio de *Anisson du Perron* (Parizo 1805) 5 frankojn, sed en la aŭkcio de *Brunet* (Parizo 1868) 1150 frankojn.

*BALIVERNERIES D'EUTRAPEL* kostis en la aŭkcio de *Soubise* (Parizo 1788) 10 frankojn; en la aŭkcio de *Brunet* (Parizo 1868) 2120 frankojn.

La dekmilo da libroj, restintaj post la usona bibliofilo *R. Hoe*, donis preskaŭ 150 milionojn da frankoj.

La 42-linia Biblio, presita fare de *Gutenberg* kaj *Fust*, kostis en la *Perkins*-aŭkcio (1873): ekzemplero pergamena 3400 pundojn, papera 2690 pundojn; sed la sama papera atingis en la *Thorold*-aŭkcio (1884) la sumon de 3900 pundoj, do 500 pli ol antaŭe kostis la pergamena.

En la londona *Sotheby*-aŭkcio (1897) oni proponis por aĉeto ĉirkaŭ cent kvindek eldonojn de Biblio, heredaĵo post lordo *Ashburnham*. La prezoj ekde 20000 markoj kreskis ĝis 40000 kaj pli, ĝis fine *Bernard Quaritsch*, la "reĝo" de la antikvaĵistoj, pagis por unu ekzemplero 80000 markojn.

Pergamena ekzemplero de la unua datita Biblio, presita fare de *Fust* kaj *Schöffer*, kostis 175 pundojn en 1815; post ok jaroj, alia ekzemplero vendiĝis je 215. Unu *Parkins*-ekzempleron oni aĉetis je 173 pundoj, por baldaŭ poste vendi je 780.

Ekzempleron de Psalmaro, presita fare de *Fust* kaj *Schöffer* en 1459, oni konsideris unusola ĝisvivinta nian tempon; *Quaritsch* aĉetis ĝin dum la *Thorold*-aŭkcio je 4950 pundoj. Tiam oni opiniis, ke tio estas la plej granda sumo, pagita iam ajn por libro. Sed, se *Nationalzeitung* el 5.1.1896 informis vere, *Quaritsch* tenis ĝin dekdu jarojn kaj ree vendis je 5256 pundoj, t.e. 105 120 markoj.

De la *Boccaccio*-verko, presita en 1471, konserviĝis ĝis nun ses ekzempleroj, inter ili unu kompleta. Por ĝi, la markizo *Blandford* dum la *Roxburghe*-aŭkcio en 1812 pagis tiutempe grandegan sumon de 2260 pundoj.

Kiel aspektas tiu afero nuntempe?

En 1969 oni anoncis por vendo en Parizo 44-paĝan manuskripton de *Denis Diderot*, priskribantan kritike unu el la parizaj "salonoj" el 1761 kaj atakantan la tiaman bildkomercadon. La manuskripto atingis prezon de 59000



frankoj, t.e. preskaŭ 12000 dolaroj.

Samjare, rara ekzemplero de *Madam Bovary* de *Gustave Flaubert*, eldonita en 1857 kaj enhavanta sur la titola paĝo dediĉon de la aŭtoro, kostis 92200 frankojn (18400 dolarojn).

Sed vere ŝokanta estis la sciigo, samjara, ke ekzemplero de la 42-linia Biblio vendiĝis je 250 000 dolaroj!

Ni vidas do, ke bibliofiloj ne avaris je mono, se temis pri dezirataj objektoj de ilia pasio. Cetere, oni vendadis ne nur unuopajn ekzemplerojn, sed ankaŭ tutajn librarojn aŭ partojn de ili. Por la kolekto de manuskriptoj, restinta post la franca ministro *Colbert* kaj ampleksanta 15 000 volumojn, Ludoviko la Dekkvina pagis dekmilon da dukatoj.

La kolekton de *R. Heber*, kiu pro sia bibliofila pasio aranĝis bibliotekojn en diversaj eŭropaj landoj, oni vendis je 50 000 pundoj; proksiman sumon donis vendo de la fama *Sunderland*-kolekto.

Sed mono ne ĉiam estis la decida faktoro koncerne vendon aŭ aĉeton. Okazadis, ke tiu-iu serĉanto sukcesis aĉeti valoregan libron je ridinde malalta prezo. Kiel ekzemplo servu la alegoria rakonto de la dominikano *Francesco Colonna HYPNEROTOMACHIA POLYPHILI*. Tiu libro, rakontanta pri la malnova arto, enhavas 170 ilustraĵojn. Ilia ĉarmo, plena de poezieco, la ornamaĵoj kaj la belega preso kaŭzas, ke inter la librokonantoj oni opinias ĝin ne nur majstroverko renesanca, sed eĉ la plej perfekta inter ĉiuj produktaĵoj de la presarto. Kaj jen tian raraĵon aĉetis *Nodier* ĉe apudsejna librovendisto je 30 centimoj!

La romianoj havis proverbon: *Habent sua fata libelli*. Ni aldonu: *Habent sua fata libellorum pretia...*

## *Ceny książek*

*Autor wyjaśnia różne znaczenia pojęcia "cena książki" a następnie przedstawia, jak kształtowały się ceny książek na przestrzeni dziejów.*

*Ponieważ ceny te są wyrażone w różnych pieniądzach, podaje podstawowe mierniki przeliczeniowe. Omawia także aukcje i ceny aukcyjne, przytaczając przykładowo szereg książek i ceny, jakie uzyskiwały one na aukcjach.*